

Diskonigu esperantajn eventojn tutmonde

Ĉu viaj eventoj estas diskonigindaj?

■ Yves Nevelsteen

Eventa Servo (<https://eventaservo.org>) estas retejo per kiu oni povas registri, listigi kaj diskonigi eventojn tutmonde. La kreinto (Fernando Ŝajani) en aprilo 2019 donacis la sistemon al Universala Esperanto-Asocio. UEA kaj TEJO instigas al la uzado de Eventa Servo por informi Esperantujon pri internaciaj, landaj kaj lokaj eventoj, kongresoj, kunvenoj, renkontiĝoj k.s.

Post registriĝo eblas aldoni eventon al la retejo. Minimume oni aldonu titolon, priskribon, dato(j)n, lokon kaj retejon aŭ retpoŝtadreson. Estas mont-rata mapeto de la loko kie okazos la evento kun ligilo al Google Maps. Retpoŝtadresoj estas aŭtomate protektataj kontraŭ spamrobotoj; nur ensalutintaj membroj vidas alklakeblan adreson.

Kondiĉoj por sukceso

La plej multaj aktivaj esperantistoj loĝas en Eŭropo. Malfacilas scii de Brazilo – kie loĝas Fernando – kio estas la konkretaj bezonoj de la movado tie. Tial interalie prezento pri Eventa Servo en la klubo en Antverpeno (Belgio) estis filmita. Ĉeestantoj donis multajn (tre pravajn!) rimarkojn. Surbaze de rekomendoj de multjaraj aktivuloj, multe pliboniĝis la retejo. Bone aŭskulti la bezonojn de uzantoj estas la unua kondiĉo por sukcesigi retejan projekton.

Dua kondiĉo de sukceso estas bone testi la retejon, uzante ĝin en la praktiko. Tial la helpanto Yves Nevelsteen persone aldonis kelkcent okazaĵojn kaj

daŭre okupiĝas pri tio. Kiam aperas iu eraro, Fernando rapide korektas ĝin. Ni ekzemple spertis multajn teknikajn problemojn pri la horzonoj. Gravus tio, ĉar eblas aboni landajn kalendarojn per Google Calendar – ĉio bone sinkroniĝu.

La ĉefa kondiĉo de sukceso evidente estas ke esperantistoj uzu la retejon. Aktivuloj iom post iom mem aldonu siajn eventojn kaj Eventa Servo iĝu la ĉefa referenca retejo por eventoj. Gravus tiurilate la ekzistanta kalendaro de *Eventoj.hu*. Ĉi tiu servo bone funkciadas ekde 1996; estas tre grava atingo. Iuj homoj demandas min kial do ne simple plu uzi tiun retejon. La ĉefa kialo estas ke ĝi teknike ne multe evoluis. Alia retejo ekzemple ne povas aŭtomate transpreni informojn de *Eventoj.hu*; oni devas mane kopii ilin. Ne eblas mem ŝanĝi datumojn (se la loko aŭ horo de okazaĵo ŝanĝiĝas ktp.). En 2020 tio estas sufiĉe nekutima situacio; jam de multaj jaroj “oni” ne plu laboras tiel. Eventa Servo ja ebligas tian transprenadon de datumoj. Aboneblas landa kalendaro per Google Calendar, ekzistas API kaj RSS. Tiel la tuto multe pli efikiĝas.

Szilvási László sciigis al la kernaj aktivuloj de Eventa Servo ke jam pluraj provoj anstataŭigi la kalendaron de *Eventoj.hu* estas faritaj en pasinteco. Ĉiufoje post iom da tempo li konstatis ke la nova retejo ĉesis funkcii. Ne sufiĉas lanĉi novan projekton; gravas la ada funkciigo dum multaj jaroj. Provizore (kaj minimume ĝis la fino de 2020) tial ambaŭ kalendaraj retejoj funkcios paralele.

Eventa Servo plej verŝajne ja sukcesos pro ĉi tiuj ĉefaj kialoj:

- Ĝi uzas aktualajn servilajn programarojn kiuj bone funkcias en fiksjaj komputiloj, tabulkomputiloj kaj poŝtelefonoj.
- Temas pri malfermitkoda programaro; ĉio estas disponebla en GitHub.
- Ekzistas komunumo de plurcento da homoj kiuj regule mem aldonas eventojn.
- La kerna skipo konsistas ne nur el talenta kaj bonvolema programisto, sed ankaŭ el spertaj esperantistoj kiuj bone scias pri la konkretaj bezonoj.
- La kernaj aktivuloj estas relative junaj.

Jam pli ol 350 aktivuloj mem registriĝis en la retejo kaj preskaŭ ĉiutage aldoniĝas novaj eventoj. Aldoni novajn erojn facilas kaj rapidas, ĉar ofte simila evento okazis en pasinteco kaj eblas duobligi ĝin, ŝanĝante ekzemple nur la daton kaj temon.

Eventa Servo estas la plej ampleksa prieventa retejo, ĉar sisteme aldoniĝas ĉiuj novaj eventoj de la kalendaroj de *Eventoj*, de *Espéranto France* kaj de *Flandra Esperanto-Ligo*. Yves abonas multajn grupojn en Facebook kaj Telegram kaj persone aldonas informojn, kiam li rimarkas ke ili mankas. Se la organizanto de evento ankoraŭ ne registriĝis en la retejo, estas sendata al li aŭ ŝi invita mesaĝo. Post kiam la aktivulo registriĝis, li aŭ ŝi iĝas administranto de la evento kaj eventuale de la organizo malantaŭ ĝi. La nova administranto pri tio estas informata per retmesaĝo.

Ĉu gravas vaste diskonigi nian agadon?

Gravas retejo kiel Eventa Servo, ĉar en ĉiu lando oni en malsama maniero komunikas pri Esperantaj okazaĵoj (Eŭropo: Facebook, Rusio: VKontakte, Usono kaj Kanado: Meetup, Honkongo: WhatsApp, iuj lokaj grupoj nur per retroŝto aŭ per Google Calendar... aŭ buŝe) kaj foje iom malfacilas trovi informojn. Almenaŭ ni inter esperantistoj bone komuniku; komencantoj kaj interesatoj havu facilan aliron al informoj! Kompreneble ĉefe gravas komuniki pri grandaj eventoj, sed teknike Eventa Servo ebligas aldoni informojn ankaŭ pri lokaj kunvenoj, kursoj, informbudoj k.s. Estas facile filtri supre de la retejo, ekzemple laŭ speco aŭ unutaga/plurtaga okazaĵo. «Mi opinias ke niaj modestaj kunvenetoj ne bezonas pli multan reklamon» ne estas bona sinteno, se ni volas ke Esperantujo kresku. Foje temas pri privataj kunvenoj, sed plej ofte novuloj/eksteruloj estas pli ol bonvenaj, ĉu ne? Ni malfermu nin al la ekstera mondo kaj kunlaboru trans la landlimoj! Povas esti tre konvinke montri dum informbudo konkrete planitajn okazaĵojn ĉie en la mondo. Homoj volas lerni lingvon kiun ili poste povos praktike utiligi diversmaniere, ne nur en la loka grupo aŭ unufoje jare dum la UK...

Dum la pasintaj monatoj, ni multe esploris pri la komunikaj kutimoj de esperantistoj en diversaj landoj. En Francio, ekzemple, en pluraj lokoj ekzistas tre aktiva movado, sed ili komunikas precipe per retejo kaj dissendolisto en la loka lingvo. Kiel hazarda eksterlanda vizitanto povas trovi aktualajn informojn pri kunvenoj de esperantistoj? Nur de konato aŭ... per Eventa Servo. Evidente iu lokulo do ja devas traduki la informojn pri la okazaĵoj kaj ilin diskonigi per Eventa Servo. Foje aktivuloj rezignas pri komunikado en Esperanto “pro tempomanko”; ĉiuj lokuloj ja komprenas la lokan lingvon... Tio estas bedaŭrinda unua paŝo al krockodilado dum kunvenoj.

Ĉu via organizo havas ĝisdatan retejon?

Unu el la ĉefaj problemoj de retejo de lokaj Esperanto-grupoj estas ke ili ne estas kompletaj kaj/aŭ sufiĉe ofte ĝisdatigataj. Apenaŭ ekzistas modernaj retejoj kun aktualaj informoj; tio donas

tre malbonan impreson. Se ni povas tion grandparte aŭtomatigi, solviĝos almenaŭ tiu problemo: malnovaj informoj aŭtomate malaperos, novajn informojn oni povos tre facile aldoni (kaj ŝanĝi aŭ forigi) kaj estas aŭtomate transprenataj de tiuj kiuj volas. Kelkaj lokaj kluboj eĉ entute ne (plu) havas retejon; komunikado al la ekstera mondo ne estas prioritato. Por iuj sufiĉas unufoje monate kunveni en amika rondo. Kelkaj eĉ preferas kunveni laŭ invito. Tio estas evidente ilia rajto, sed se ni volas ke Esperantujo kresku, necesas pli malfermi nin al la ekstera mondo. Bone komuniki ene de Esperantujo – almenaŭ pri publikaj eventoj – estas baza kondiĉo por tio.

Pri kelkaj landoj vi trovos malmultajn informojn en Eventa Servo, ekzemple pri Ĉinio. Ĉu rilatas al tio ke homoj ne volas ke oni (la registaro) sciu kie esperantistoj kunvenas? Eble temas pri kultura diferenco, pri malsamaj kutimoj. Sed se okazas publika evento kiel Ĉina Esperanto-Kongreso, almenaŭ devus esti haveblaj esperantlingva retejo kaj retroŝtadreso de kontaktpersono.

Aŭtomatigo, sinkronigo kaj tempoŝparigo

En la ĉefpaĝo de Eventa Servo ĉiam estas montrataj nur hodiaŭaj kaj estontaj eventoj. Pasintaj eventoj aŭtomate malaperas de la ĉefpaĝo, sed restas alireblaj kaj troveblaj, ekzemple ĉe la paĝo de la organizo. Unu el la celoj de la projekto estas helpi aktivulojn ŝpari tempon. En la retejo de Esperanto Nederland, ekzemple, ne aperis kompleta superrigardo de aktivuloj en la lando, simple ĉar mankis tempo aŭ energio al la respondeculo. Ili anstataŭis la antaŭan Google Calendar per Eventa Servo; ne nur la kalendaro nun estas pli kompleta, sed ĉiu loka grupo povas ĝin mem ĝisdatigi. Espéranto Wallonie (Belgio) faris same. Kiam lanĉiĝis la nova retejo *UEA Facila*, ĝi enhavis propran kalendaran sistemon (<https://uea.facila.org/kunvenoj/>). Anna Löwenstein mem mane kopiadis multajn eventojn, interalie de la kalendaro de *Eventoj.hu*. Tim Owen aŭtomatigis la afiŝadon de eventoj de Eventa Servo en tiu loko; multe pli efikas labori tiel. Ni eksperimentas ankaŭ pri afiŝado de eventoj per Google Calendar, kiel en la paĝaro www.benelukso.eu. Eblas krei eventon en Eventa Servo kaj facile ĝin diskonigi al Facebook, Twitter aŭ per retroŝto.

SEO – optimumigo de serĉado per Google kaj aliaj retaj serĉiloj

Eventoj en Eventa Servo estas facile kaj rapide troveblaj per Google, ĉar la retejo estas optimumigita por tiu serĉilo. Gravus! Tiel ne nur intence, sed ankaŭ hazarde homoj trovas Esperantajn okazaĵojn sur interreto.

Organizoj

Eblas aldoni informojn pri organizo. En tiu loko estas mallonga priskribo pri la organizo kaj superrigardo de pasintaj kaj okazontaj okazaĵoj. Utilas havi aliron al pasintaj okazaĵoj, ĉar vi povas uzi ilin kiel bazon por krei okazontajn. Malfermu ekzistantan eventon kaj alklaku «Duobligi» – ĉiuj informoj estas kopiataj kaj sufiĉas, ekzemple, nur ŝanĝi daton kaj temon.

Mallongaj ligiloj

Kiam Eventa Servo lanĉiĝis, ligilo al evento estis tre longa. Ĝi intertempe ne nur pli mallongiĝis, sed ankaŭ ebligas mem elekti mallongan nomon. Ekzemple, <https://eventaservo.org/les2020>. ligas al Somera Esperanto-Studado.

Kunlaboru kun ni

Ĉu vi foje (kun)organizas okazaĵon kaj ŝatus ĝin diskonigi per Eventa Servo? Registriĝu en la retejo per <https://eventaservo.org/r>.

Ĉu vi volas diskuti aŭ kunlabori kun ni? Prefere faru tion per la Telegram-babilejo <https://eventaservo.telegram.org/>. aŭ simple sendu al ni retmesaĝon al kontakto@eventaservo.org.

Multe evoluis kaj plu evoluas la retejo de Eventa Servo. Statistikojn eblas konsulti en <https://eventaservo.org/statistikoj>. Ni planas aldoni multajn kromajn utilaĵojn. Superrigardo de solvendaj cimoj, plibonigoj kaj novaj ideoj estas publike havebla en GitHub: <https://github.com/eventaservo/eventaservo/issues>.

Konkludo

Ni forte kredas ke Eventa Servo multe helpas landajn kaj lokajn asociojn (kaj individuojn) pli efike disvastigi informojn pri Esperantaj eventoj. Nun foje mirige malfacile estas troveblaj informoj pri kunvenoj de esperantistoj; ni uzu ĉiujn teknikajn eblojn por ŝanĝi tion!